

# Argentina

## E-Vento

10-a jaro n-ro 23 Oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo 2005 [3]

### Printempas en Argentino

“Post nigra nokto venas brila tago, kaj post malvarma vintro... bela verda printempo”. La tuta naturo reverdiĝas de la nordo ĝis la sudo. Estas tempo por semi kun granda espero je rikolto. Ĉiu regiono havas propran pejzaĝon tra tuta Argentino kaj kiel anstataŭanto de somero la suno pli longe daŭras ĉe nia blua horizonto.



#### Printempe

Sur la parkvojoj petole kuradas infanoj,  
Levas ĉielen nun siajn  
kandelojn kaŝtanoj.  
Verdas la tero kaj bluas la mar' kaj ĉielo,  
Koron sopire ŝveligas blankanta ŝipvelo.  
Ĉie vasteco, printempa aromo, sunlumo,  
Birda ĝotrilo, senĉesa sonoro kaj zumo.  
Kial ĉi tion mi kvaŭza ne vidas,  
ne sentas?  
Kial ĉi-jare la koro obstine silentas?

*Hilda Dresen, [1896-1981]*

Estonino; radiotelegrafistino. Lernis Esperanton en 1913. Kunlaboranta de “Literatura mondo”, “La nica literatura revuo”, “Norda prismo” k.a. Multe tradukis poeziojn el la estona, rusa kaj germana lingvoj.



# Argentina E-Vento

10-a jaro n-ro 23 2005:3

Oficiala organo de

Argentina Esperanto-Ligo

[Argentina Esperantisto 1917-1995]

Aperas kvaronjare/Trimestral

## Redaktoro -ekde 1996-

Rubén T. Diaconu Tkachenco

Calles 119 y 122

AR-H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña

Argentino

E-mail: rubendiaconu@yahoo.com.ar

## Kunlaborantoj:

Rubén Sánchez k Fernando Inocencio

--Pri subskribitaj artikoloj

respondecas iliaj aŭtoroj--

## Argentina Esperanto-Ligo

Fondita la 12-an de aprilo 1941

Re-fondita surbaze de AEL-AEA la

9-an de decembro 1995

TTT-ejo: [www.esperanto.org.ar](http://www.esperanto.org.ar)

## AEL-Estraro

Prezidanto: *Alcides P. Wentinck*

Vicprezidanto: *René Arce*

Sekretario: *Roberto Sartor*

Vicsekretario: *Fernando Inocencio*

Kasisto: *Mario José Miranda*

Vickasisto: *José B. Dioguardi*

## Komisiitoj

Instruado: *Rubén Sánchez*

Libroservo: *R. Arce*

Disvastigado: *S. Rottenberg*

Arĥivo: *María Berna Morzán*

UEA-Komitatano A: *M. Casartelli*

Ĉefdelegito: *R. Sánchez*

Kotizperanto: *M. J. Miranda*

Argent-EJO: *Elisa Vázquez Abraham*

## AEL Jarkotizo

Individua Membro:.....\$ 20,00

Junulo kaj Emerito:.....\$ 10,00

Virtuala Membro

-kaj donacoj-: ..... laŭvole

## El la Redaktejo

Pere de ĉi-tiu numero, printempa, finiĝas serio de artikoloj pri sezonoj en Argentino kaj ni esperas ke ili plaĉis al vi kaj samtempe iom helpis plibone koni nian mirindan landon, krom la E-aktivadon kiu iom post iom plifortiĝas kaj plivastiĝas.

Bonan legadon!

## Enhavo

<b>AEL-Informas</b> .....	3
Vizito en Bonaero.	
Kordobo.	
Asembleo de BEA.	
Argentino premiita de UEA.	
Datreveno de SEK.	
<b>Internacionales en pocas lineas</b> .....	5
La Revista <i>Esperanto</i> en su Centenario.	
Esperanto en el Parlamento Europeo.	
Ferrovianos Esperantistas en Rumania.	
<b>Novajoj</b> .....	6
Libro: Vojaĝo en Esperanto-lando.	
<b>Amerike</b> .....	7
Brazila Kongreso en <i>Porto Alegre</i> .	
Projekto NESTO viglas....	
Unua Kunveno de Esperanto,	
en Paragvajo.	
Nova Ekvadora TTT-ejo.	
ELNA-kongreso en <i>Austin</i> , Usono.	
Esperanto en Nikaragvo.	
Pri Esperantistoj en Bolivio.	
<b>E-Disvastigo</b> .....	11
Argumentoj.	
<b>Internacie</b> .....	12
La Plejpleja E-Festivalo en Finnlando.	
Miaj impresoj pri la 17-a Aroma Jalto.	
SEF havas novan prezidanton.	
<b>Poemo</b> .....	15
“Amo Forestanta”	
<b>El la Leterkesto</b> .....	15
<b>Science</b> .....	16
Nia Spacŝipo.	

## Kovrilpaĝe

Printempaj argentinaj fotoj.

Maldekstra: Neuquén; dekstra supre:

Neuquén; dekstra malsupre: San Juan



## Vizito en Bonaero

Laŭ anoncite okazis en Bonaero, sukcesa kunveno "KOLOKVO KUN ENRIKO ELLEMBERG", en la BEA-sidejo de strato Paraguay, kun prelego de Enriko Ellemberg, ĵus alveninta el Kalifornio, Usono, kie li loĝas.

Unue li rakontis pri siaj "Travivaĵoj dum la UK en Pekino". Kun la helpo de portebla komputilo, Enriko donis vivigan raporton pri sia vojaĝo al 89-a UK, kie li oficiale reprezentis nian landon -"la plej fora lando el Ĉinio". Kun centoj da fotoj videblaj en la komputilo, parolis pri la mirindaĵoj de Ĉinio, la Kongreso mem kaj la tre afablaj kaj amikemaj rilatoj kun la ĉinaj ges-anoj, kiuj eĉ gastis lin kaj akompanis dum siaj promenadoj en Pekino kaj la vojaĝo al Shanhajo.

Due, li volis enfazi pri la propran sperton en la uzo de la lingvo, ekde kvardeko da jaroj kiam li lernis Esperanton en *Rosario (Santa Fe)*.

Enriko estas entuziasma kaj sukcesa instruisto de Esperanto, nun pere de la retkursoj. Do li komentis la "Portalon" de paĝoj de Esperanto kiun kreadis, kaj ĉiutage ampliigas, en la Interreto. Ĉefe li komentis la nomitan "Paŝoj por lerni kaj uzi Esperanton" kie troviĝas ĉiuj aliroj por informiĝi en la reto, kaj havi bezonatan materialon kaj indikojn por ke gelernantoj, post la unua baza kurso, komencu uzi Esperanton en la ĉiutaga vivo, per korespondado, literaturaj verkoj, revuoj, radioprogramoj kaj nun pere la e-poŝto kaj babilejoj.

La sperto en la komuniko internacia pere de Esperanto, kaj partopreno en internaciaj kunvenoj estas io ne forgesebla kaj vera ĝuado de la homa socia amikema interkomunikado, sen baroj nek limoj.

Dudeko da partoprenintoj ĉeestis, kaj rajtas mencii kelkajn novajn lernantojn, s-non Clair Mahé (vizitanto el Francio), s-rinon Barbara Kaminski, (redaktorino de *Nasza Gazeta*, de la Bonaera Pola Komunumo), s-ron Franco Agostinelli, de ONG "Apronac", Marcelo D. Lucero, nome de Argent-EJO. Demandoj kaj proponoj de la ĉeestantoj estis foje ankaŭ hispanlingve responditaj aŭ komentitaj.

Dum la lasta AEL-Asembleo de februaro, oni petis al AEL-komitatoj, organizi oftajn kunvenojn kaj prelegojn en Esperanto por revivigi publikan Esperanto-agadon en nia urbo, kaj apogi similajn agadojn en ĉiuj niaj Rondoĵoj de la lando.

Alcides P. Wentinck, AEL-prezidanto, dankis al Enriko, ĉi foje nia prelegisto, pro lia profesia prelego en flua komprenebla Esperanto, al kiu ĉiuj niaj s-anoj estis invititaj partopreni.

Alie, en la nova virtuala mondo de interreto, sen limoj de spaco kaj tempo, ni klopodos daŭrigi nian ĉiutagan interrilaton pere de Esperanto, ĉar ni scias ke "nia diligenta kolegaro ne laciĝos", celante ke la popoloj faru en konsento "unu grandan rondon familian" (Z).

*R. Sartor, sekretario*

## **Kordobo**

Se pri Kordobo temas, mi povas informi al interesitoj, ke en ĉefurbo Kordobo ni kunvenas por praktiki E-on, ĉiu du semajne, sabato, ĉe: strato *Oncativo* n-ro 107 (unua etaĝo) je la 11h00.

René Arce

9 de Julio 1586

TE: 0351-4806619

## **Asembleo de Bonaera E-Asocio**

Kiel informite, la 20-an de junio 2005 okazis kunvokita asembleo de la bonaeranaj esperantistoj. Bonaera urbo, havas propran Esperanto-asocion ekde la jaro 1906, kaj survivis al propraj travivaĵoj dum centjaroj sub diversaj formoj kaj nomoj, sed de la jaro 1966 havas propran sidejon en urbo-centra strato *Paraguay* 2357 kaj juran personecon. Post la rezigno de sia lasta prezidanto, oni kunvokis asembleon laŭ la nuna statuto por elekti novan komitaton kaj revivigi la asocion. Ĉeestis nur ok el la centoj da esperantistoj de la urbo. Do la ĉeestantoj decidis konstitui sin en "Provizora Komitato" por studi la estonton de la asocio kaj sidejo, kaj rekunvoki novan "eksterordinaran asembleon" la 10-an de decembro, okaze de la "Esperanto-tago". Tamen, oni interkonsentis ke la nuntempa krizo estas preskaŭ sama al ĉiuj E-grupoj en la mondo, Do, oni proponis studi eblan ŝanĝon en la strukturo, -ekz. al Kultura Centro Esperanto-, iom pli akorde kun la nunaj leĝoj de la Aŭtonoma Urbo Buenos Aires.

La Povizora Komitato estas: Alcides P. Wentinck (prezidanto); Helena Mor-

**La Neŭken' Esperanto-Rondo** komencas siajn unuajn paŝojn, dank'al la laboro de Livia Barth, Mercedes Cofré, Francisco Zilli, Margot León kaj Cecilia Prudkin. - *Patagonia Bulteno*

teo (vicprezidantino); R. Sartor (sekretario); Inés Beaumont (vicsekretariino); Mario Miranda (kasisto); Ricardo Saidman (1-a voĉdonanto); César Raffo (2-a voĉdonanto); Alfredo Valle (instruisto-delegito). Informis neeban ĉeeston: Silvia Rottenberg, José Dioguardi, Miriam Tabak, Alberto Auné kaj Roberto Maruottolo. **RoSar**

## **Argentinano premiita de UEA**

Ĝoje ni informas ke s-ano Alejandro COSSAVELLA, konata muzikisto, ricevis la Trian Premion pro sia Kanzono "LA PORDO" en la BELARTAJ KONKURSOJ de UEA 2005. Tia informo venis rete en la fermo de la 90-a UK, Vilno, Litovio k Gazetaraj Komunikoj de UEA. Gratulojn al nia kara Alejandro!

## **Datreveno de SEK**

La 20-an de aŭgusto 1989 estis fondita Saenzpenja Esperanto-Klubo en urbo *Pres. R. Sáenz Peña, Chaco*.

Menciindas ke tio okazis rezulte de E-kursoj gviditaj de profesoro Francisco Veuthey kaj post sukcesa okaziĝo de la 49-a Argentina Kongreso de Esperanto realigita en tiu urbo en julio 1989.

Ĉefaj laboroj kaj atingoj de la grupo estis, i.a. akiro de oficiala Municipa Rezolucio pri kaj la placo kaj la strato Esperanto; la 3-a Junulara Tendumado kun reorganizo de Argent-EJO; organizado kaj sukcesa 2-a Interlanda Konferenco pri Instruado, (1992); la 52-a Argentina Kongreso, 1998; E-kursoj gviditaj de profesoro Rubén Diaconu kaj publika disvastigado de la Internacia Lingvo per oficiala organo SEK-Bulteno kun plena apogo de la amaskomunikiloj. La festdatreveno okazis sabate, la 20-an de aŭgusto, ĉe urbocentra restoracio. - *SEK-Bulteno*

# INTERNACIONALES en pocas líneas

- **La revista *Esperanto* en su centenario**

Hace 100 años, más precisamente el 18 de junio de 1905, en Céret, Francia, Paul Berthelot, [1881-1910], publicó el primer número de la gaceta *Esperanto*, que posteriormente, en 1908, Hector Hodler, [1887-1920], convirtió en el órgano oficial de UEA. Su redactor ahora es Stano Marček, [Eslovaquia], y el aspecto gráfico de la revista sin dudas difiere bastante de aquel primer número, pero su distribución actualmente alcanza a todos los miembros de UEA en 115 países.

- **Exitoso UK en Vilna, Lituania**

*Breve informe extraído del portal*  
*www.gxangalo.com/*

Como estaba previsto, el 90º Congreso Universal de Esperanto, [UK], se realizó exitosamente del 23 al 30 de julio, en Vilna, Lituania. Tanto los periódicos locales, como la radio y la televisión brindaron una información de primera mano, que es altamente beneficiosa para este país recientemente integrado a la Unión Europea. Además, gracias a Internet, sus actividades pudieron ser seguidas por los interesados en todo el mundo y en unas cuarenta lenguas. El gobierno lituano ha apoyado oficialmente este Congreso, colaborando en su financiación y tanto el Presidente, como su Ministro de Relaciones Exteriores y el Alcalde de Vilna, se animaron a efectuar sus saludos en esperanto

Las múltiples actividades de un Congreso especializado, como lo es el de esperanto, no se pueden resumir en una



*Reval Hotel Lietuva sede del 90º UK*

nota periodística, ya que comprenden una enorme cantidad de conferencias y reuniones al margen de las asambleas generales. Un boletín diario fue impreso para los congresistas para poder seguir el programa, con actividades para universitarios, científicos, grupos religiosos o culturales, comerciantes o editores de libros en esperanto y su distribución mundial”.

- **Esperanto en el Parlamento Europeo:  
Margarita Handzlik y Jan Figel**

El pasado 5 de julio, Margarita Handzlik, (EPP-ED), representante de Polonia en el Parlamento Europeo, fue recibida en Strasburgo, por Jan Figel, miembro de la Comisión Europea de Educación y Cultura. El encuentro

estuvo dedicado íntegramente a la problemática de los idiomas en la Unión Europea. Jan Figel escuchó con gran interés la propuesta sobre el posible uso del esperanto como medio de facilitar el estudio de las lenguas foráneas. Además del gran interés demostrado, Figel solicitó más información en ese sentido y se acordaron realizar otros encuentros de trabajo para proseguir con el tema.

- **Ferrovianos Esperantistas en Rumania**

En Braşov, ciudad central de Rumania, del 7 al 14 de mayo de 2005, se realizó el 57º Congreso de la Federación Internacional Esperantista Ferroviaria, [IFEF]. El encuentro contó con la participación de 274 integrantes de 22 países y el personal apoyo de diversas autoridades políticas, culturales y ferroviarias. Bajo el lema: “Los rieles ligan el país, Esperanto los pueblos” se desarrolló un importante e interesante programa. Además de conferencias por supuesto, por las noches los participantes pudieron disfrutar de un excelente espectáculo cultural y folclórico. Otro acontecimiento interesante lo constituyó la inauguración de un jardín, [plazoleta], frente a la Universidad local, el que llevará el nombre Esperanto y en el que los delegados de 22 países plantaron 22 rosales.

El próximo congreso de IFEF se realizará en Shanghai, China, del 6 al 13 de mayo de 2006.

*Heroldo de Esperanto*  
Nº 7, 2005, pág. 1

Ĉu vi jam aliĝis al AEL?  
Bv. informiĝi ĉe  
paĝo 14

# N O V A Ĵ O

## **Libro: "Vojaĝo en Esperanto-lando" denove haveblas.- Roterdamo**

La nuntempe plej furora Esperanta libro, "Vojaĝo en Esperanto-lando" de Boris Kolker, estas denove havebla, nun jam en tria eldono. Ĝia antaŭa eldono aperis en julio 2002 kaj la tuta eldonkvanto elĉerpiĝis en iom pli ol du jaroj. La unua eldono aperis en 1992 ĉe la Moskva eldonejo

Progreso, sed en sia dua eldono ĉe UEA ĝi spertis ĝisfundan transformiĝon. Ĝi internaciĝis enhave kaj ĝia grafika prezento fariĝis moderna kaj tre alloga. La plej nova eldono konservis la viglan dezajnon de Francisco Veuthey kaj fariĝis eĉ pli bela, ĉar ĝi aperis en pli granda formato, kun pli grandaj literoj kaj pli klaraj bildoj.

Krome, troviĝas en ĝi kelkaj novaj ilustraĵoj. La tekstaj ŝanĝoj estas minimumaj -- nur du tekstoj, kiuj intertempe malnoviĝis, estas anstataŭigitaj -- pro kio la dua kaj tria eldonoj estas uzeblaj samtempe en kursoj. Posedantoj de la nova eldono tamen profitos de multaj etaj modifoj (korektoj, aktualigoj, revortumoj kaj aldonaj informoj) en la komentarioj kaj apudtekstaj babiloj. Por la tria eldono Boris Kolker ankaŭ aldonis koncizajn informojn pri tipoj de planlingvoj, fundamenteco-oficialeco, Oficialaj Aldonoj, agad-direktoj de UEA, ktp.

La teksto pri Interreto estas aktualigita kaj reverkita. Laŭ peto de multaj legantoj estas aldonita ankaŭ indekso de nomoj, kio ebligas facilan serĉon de informoj en tiu ĉi unika verko, kiu samtempe estas perfektiga kurso de Esperanto kaj vastpanorama gvidlibro pri la Esperanta kulturo.

Malgraŭ pli granda formato, la prezo de la 280-paĝa libro restas 18,00 eŭroj. Ekde samtempa mendo de minimume 3 ekz. ĉe la Libroservo de UEA oni ricevas trionan rabaton. Aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 2,25 eŭroj) kaj por klientoj en EU 6% por imposto.

Aktualaj informoj pri "Vojaĝo en Esperanto-lando" estas troveblaj en la retpaĝo: <http://eo.wikipedia.org/wiki/Vojaĝo>

*Gazetaraj Komunikoj de UEA,*  
n-ro 209

# Brazila Kongreso de Esperanto

*Plensukcese kun partopreno de pli ol 400 esperantistoj,  
[3 argentinanoj], de la 19-a ĝis la 23-a de julio, en suda urbo  
Porto Alegre, RS, okazis la 40-a Brazila Kongreso de Esperanto  
kaj la 25-a Junulara E-Kongreso, de BEJO*

“Se oni devus epiteti la 40-an BKE, oni povus nomi ĝin la "koridora kongreso". FAPA [*"Faculdades Porto Alegresenses"*], la ejo kie okazis la Kongreso estis tiel taŭga, ke ĝi permesis al la partoprenantaro konstantan renkontiĝon kaj riĉan interŝanĝon de ideoj kaj spertoj. Partoprenis ĝin homoj el pluraj brazilaj ŝtatoj kaj gesamideanoj el Germanio, Portugalio, Usono, Ĉinio, Urugvajo kaj Argentino.

La solena malferma kunsido okazis vespere en la bela aŭditorio de *"Assembléia Legislativa do Estado do Rio Grande do Sul"*. Kvankam la surstrataj termometroj signis 5 gradojn super nulo, la interna etoso estis tre varma kaj la ĉeestantaro, kiu preskaŭ tutplenigis la aŭditorion, atente akompanis la salutvortojn de la aŭtoritatuloj kaj ankaŭ la festparoladon de Paŭlo Nascentes. Post mallonga paŭzo prezentiĝis Neide Barros Rego, folklora pola dancensemblo el Erechim kaj tipa gaŭĉa dancgrupo.

La sekvan tagon (merkredo), komenciĝis propradire la laborkunsidoj kaj prelegoj en FAPA, kie ankaŭ funkciis la Libroservo de BEL kaj pluraj giĉetoj de diversaj organizaĵoj.

La Kongreso bone eĥis en la gazetaro. Almenaŭ mi mem spektis en la TV de mia hotela ĉambro intervjuon kun Ge-raldo Mattos, dissendita pere de Eduka Kanalo pere de sia TV-ĵurnalo. Givanildo Ramos Costa ankaŭ estis intervjuita en kabla TV-kanalo (NET) pri la evento.

En la dua tago de la Kongreso (ĵaŭde), oni povis spekti plurajn interesajn prelegojn, nome: E-Movado dum Tutmondiĝo (Ivaldo de Souza), Muzika Terminaro (Alfredo Arangon), Kiel Rakonti Rakontojn per Imagoj (Joe Costa), Amfora Erao: Ĉu ni jam Atingis? (Adonis Saliba), Kial la E-ista Movado? (Givanildo Ramos Costa), Studentaj E-istaj Grupoj (James Milanez), Proponoj kaj Realiĝoj (Pedro Cavalheiro), Argentina Historio (Josefo Lunazzi), Konsideroj pri tradudo de "Dom Casmurro" (Paulo Viana), La Sperto de la Junularo (Ademar Diniz). Krome daŭris ĉiuj kursoj kaj ankaŭ okazis speciala evento nomata Kvizo-Ludo *"Show do Milhão"*, gvidita de Ivaldo A. de Souza, kun disdono de premioj al la gajnintoj.

Vespere okazis Kunfrantiĝa Vespermanĝo ĉe unu el la Centroj pri Gaŭĉaj Tradicioj, kie, interalie, estis prezentitaj dancoj de la gaŭĉa folkloro. Partoprenis ĝin proksimume cent gesamideanoj, kiuj amuzis sin dancante en gaja etoso.

Posttagmeze okazis Ĝenerala Asembleo de BEL. Oni diskutis kaj aprobis la Raporton pri Aktivecoj de la Jaro 2004 kaj ties Bilanco. Pedro Cavalheiro prezentis al la ĉeestantaro kelkajn proponojn de novaj agadoj por BEL kaj estis anoncita ke la 43-a BKE en 2008 okazos en Fortaleza.

La vendreda programo ankaŭ estis riĉa kaj fruktodona. Okazis la jenaj prelegoj: La Esperantista Pioniro Ary Zamora (Alberto Flores), Kio estas SAT (Josefo

# Projekto NESTO viglas...

Tiel enkondukas la ĵusa artikolo de Revuo Esperanto, julio-aŭgusto 2005, pri la aktiva Projekto NESTO, kiu helpas instrui kaj diskonigi Esperanton tra la mondo. Ankaŭ la projekto estos temo por "Tago de la Lernejo" de la proksima ILEI-konferenco ĉe UK en Vilnius (vidu la programon).

La interreta paĝaro de projekto NESTO ŝanĝiĝis lastatempe kaj inkluzivis novajn paĝojn kun pli eksplikaj informoj. La itala lingvo estis lanĉita kiel alia ebla nacilingvo por ke interesitoj enregistriĝu en la projekto. Tiu estas plia ebleco inter la 9 lingvoj de la projekto: angla, hispana, franca, nederlanda, pola, portugala, esperanta, sveda. La projekto intense agas en la parigado de instruistoj kaj lernantoj por samaj nacilingvoj kaj geografiaj regionoj. Ĝi estas subtenita de Grupo Monda kaj pedagogie apogita en Kibernetika Pedagogia Grupo de Universitato de San-Paulo. Aliflanke, Radio NESTO ankaŭ furoras por helpi parolan kaj kantatan instruadon de Esperanto. Gerda Malaperis, artisme kaj sone interpretata de Emilio Cid kaj skipo, estis unu el la lastaj programeroj de la Radio. La momento estas por kunvoki esperanto-instruistojn por baza instruado. La kandidatiĝo por instruado estas en la paĝaro de la projekto, post respondo de simpla demandaro. Al ĉiuj amikoj de Esperanto, ni petas la diskonigadon de la projekto en siaj regionoj, ĉefe en bibliotekoj kaj universitatoj, kie estas la plej verŝajnaj interesitoj pri lernado de Esperanto per interreto. Kelkajn anoncajn indikojn oni disponigas en la PN-retloko.

*Adonis Saliba Silva*

Lunazi), TV União Planetária (Paulo Nascentes), Lidja Zamenhof, la Filino de Esperanto (Cesar D. Soares), Go-Ludo, Arto sur Tabulo (Reinaldo Zaghetto), Traduko de Komputilaj Programoj (James Milanez). Krome ankaŭ okazis: Fakkunsido de Oomoto, Paroliga Rondo (Ademar Diniz), Praktikado Kiel/Kie (Ademar Diniz). Kaj finiĝis la pluraj kursoj diversnivelaĵ komenciĝintaj en la unua tago de la Kongreso. Sabate matene okazis la Ferma Kunsido.

Samtempe okazis la 25-a BEJO Kongreso, kun la partopreno de dekoj da junuloj. Oni prezentis prelegojn, organizis ludojn kaj prezentis rusan filmon kun subtekstoj en Esperanto. La BEJO-grupo ankaŭ respondecis pri la organizado de la balo, kiu okazis ekde la 21h00 en najbara dancejo. Notinde estis la prezentado ene de la programaro de BEJO-Kongreso de 30-minuta dokumenta filmo pri Esperanto, parolata en la portugala lingvo kaj farita de juna studento el Brasilia. Post la prezentado sekvis varmega kaj daŭra aplaŭdo.

Estas ankaŭ menciinde, ke dum la Kongreso estis ankaŭ lanĉitaj pluraj novaj libroj. Eldonejo Oportuno lanĉis plurajn titolojn interalie La Divenistino kaj Aliaj Rakontoj, de Machado de Assis, en traduko de Paulo Sergio Viana. Eldonejo de Universidade Federal de Santa Catarina lanĉis ampleksan lernolibron verkitan de Marco A.F. Teixeira. Brazila Esperanto-Ligo lanĉis la KD de la Kurso "Esperanto para Principiantes". Kaj Gaŭĉa E-Asocio la belegan kaj utilan libron de Ivo Sanguinetti "Gaŭĉa Vivo".

Kelkvorte: la POA-Kongreso plene plenumis sian celon t.e. okazis en harmonia etoso kaj estis tre plaĉa kaj riĉa laŭ la vidpunkto de taŭga forumo por interŝanĝo de spertoj inter la diversdevenaj partoprenantoj”.

*Laŭ raporto de Aloisio Sartorato*



# Unua Kunveno de Esperanto en Paragvajo

En la vespero de la 28-a de junio 2005, en la hotelo 'Zaphir' de Asunción, ĉefurbo de Paragvajo, okazis la **Unua Renkontiĝo de Esperantistoj** en Paragvajo, kunvokita de profesorino Lilia Dora Samudio López:

<liliesperanto23@yahoo.com>

Partoprenis grupeto da instruistinoj kaj gelemantoj. Dum la renkontiĝo oni reviziadis la agadon de lastaj jaroj post kiam en la jaro 2000, instruistino Deolinda Vera López, rekomencis instruadon de Esperanto en Paragvajo. Oni decidis fondi 'Paragvaja-n E-Asocio-n' kaj aliĝi al UEA.

<http://gxangalo.com/hispana/modules/sections/index.php?op=viewarticle&artid=173>

## **Breve crónica del Primer Encuentro Esperantista 2005 en Paraguay**

Como estaba previsto y oportunamente se había informado, el día martes 28 de junio, en la tarde, se realizó en el hotel "Zaphir" de Asunción, el Primer "Encuentro Esperantista" del Paraguay, con ocasión de la visita de esperantistas argentinos.

Convocado por la prof. Lilia Dora Samudio de López -que organizó y dirigió el encuentro- asistieron al mismo instructoras de esperanto de Asunción, Araguá, Copiatá y Yataity del Norte y un grupo de alumnos y simpatizantes.

Durante el mismo se revisó todo lo actuado en los últimos años, al reiniciarse la enseñanza del esperanto en Paraguay, por parte de la Prof. Deolinda Vera López en el año 2000. Como conclusión de este primer encuentro se decidió que es voluntad de

los cientos de esperantistas y simpatizantes paraguayos, fundar la "Asociación Paraguaya de Esperanto" y afiliarse a UEA, Asociación Universal de Esperanto.

Se proyecta constituir en Asunción o en Yataity del Norte, el primer "Centro Cultural Esperanto" y diversos "Círculos de Esperanto" en cada lugar donde ya se está enseñando el idioma internacional, con los respectivos "Delegados". Hay además mucho optimismo, por la próxima expansión de Internet a través de todo Paraguay lo que permitirá el uso intensivo del esperanto en la comunicación internacional.

Muy pronto "Esperanto-Paraguay" tendrá su página en Internet, donde podrán verse fotografías y videos, con archivos de canciones y "cursos" además de artículos y textos informativos no solo en esperanto y castellano sino también "Abañeéme" -en idioma Guaraní.

Desde Buenos Aires viajaron los profesores Inés Beaumont y Roberto Sartor, en representación de la Asociación Argentina de Esperanto y como corresponsales de Ĝangalo, invitados a colaborar en la organización del Movimiento Esperantista Paraguayo. Las instructoras presentes fueron Hérica Rosa Domínguez, Cynthia Romina Cardozo, Luz Divina Ortíz, Noelia Bobadilla y Juana María de Lara.

Es notable la actividad realizada en pocos años: con un centenar de alumnos que han realizado algunos de los cursos introductorios, el propio manual "Minicurso de Esperanto (de J. Sales) editado en Asunción en el año 2003 y

la konstitución de una "Biblioteka de Esperanto", en la Biblioteka Pùblica de Yataity del Norte, una ciudad de 30 mil habitantes, al norte de la capital, donde tiene su sede la más grande empresa harinera del Paraguay "E-Remmele S.A.C.I."

El encuentro fue amenizado con canciones en esperanto, acompañadas por la guitarra de Alexis Rodrigo Samudio y con bebidas servidas por el bar del Hotel.

¡Todo un éxito!

Contactos a: [liliesperanto23@yahoo.com](mailto:liliesperanto23@yahoo.com)

*Raportis Roberto Sartor*

## Nova Ekvadora TTT-ejo

*R. Corsetti*

Kiu ne ĝojas pro la revigliĝo de Esperanto en Ekvadoro, kvankam tiu ne estas amerika esperantisto sed eùropa esperantisto kaŝe loĝanta en Ameriko! Jen ricevita mesaĝo kiun mi volas diskonigi:

al:

[esperanto-ekvadoro@yahoogroups.com](mailto:esperanto-ekvadoro@yahoogroups.com)

de: "homoera"

<[estebandres68@hotmail.com](mailto:estebandres68@hotmail.com)>

temo: Nova Ekvadora Paĝo

Saluton!

*Mi estas Esteban Sánchez, la faristo de la paĝo*

*www.esperantoecuador.galeon.com, mi estas faranta novan paĝon por la EEA (Ekvadora Esperanto-Asocio). Mi esperas ke vi ŝatos la paĝon. La ekvadora aocio estas faranta multajn paŝojn ĉi tie kaj mi kredas ke ĝi estos vero en malmultaj monatoj dankon al vi.*

*Dankon al ĉiuj.*

*Amike:*

**Esteban A. Sánchez J.**

*Kito, Ekvadoro*

# ELNA-Kongreso en Austin

**Teksaso, Usono**

De la 10-a ĝis la 13-a de junio okazis la 53-a Landa Kongreso de Esperanto-Ligo de Norda Ameriko. Ĉeestis ĉirkaŭ 90 aliĝintoj, do la kongreso pli grandis ol lastatempaj kongresoj, kaj ŝajne ĉiuj tre ĝuis ĝin kaj ja taksis ĝin sukcesa.

## Pri la Kongreso en Austin

"Hieraŭ vespere mi revenis de Austin, Texas, kie mi partoprenis la ELNA Kongreson. Ĝi estis sufiĉe interesa. Estis vizitantoj de aliaj landoj, ankaŭ ĉina profesoro kiun mi ekkonis en Pekino.

La pli interesa afero de la kongreso, estas ke mi neniam aŭskultis kroko-diladon dum la tuta tempo.

Mi kredas ke la partoprenantoj estis tro malmultaj, malpli ol 100. Samtempe, estis bona partopreno de ne esperantistoj, kiuj estis invititaj al komenca kurso. Oni diris ke venis 48. Mi estimas tiu kvanto iomete alta, sed mi scias ke estis plena salono. Sed mi ne scias kiom de la "lernantoj" estis, kiel mi, ne komencantoj.

Sinjoro Philipp Dorcas estas la nova prezidanto de ELNA por la venontaj 3 jaroj. Mi multe parolis kun li. Li ŝajnas esti tre aktiva kun grandaj deziroj de progresigi la esperanta movado en Usono. Salutas vin"

**Enrique Ellemberg**

*Fremont, Kalifornio, Usono*

## Esperanto en Nikaragvo

"Tre estimataj geamikoj: La 2-an de julio, ni komencis kurson de la lingvo Esperanto en la domo de s-ro Iván Araika en Managvo. Ni invitas al ĉiuj interesatoj kunveni kun ni dum

la venontaj sabatoj. Nia adreso estas: Eklezio San Nicolas de Tolentino, ducent metrojn suden, 10 metrojn Orienten, Campo Bruce, Managvo, Nikaragvo.

La unua leciono estis tre multe suksesa, nur ni havos malfacilecon pro manko da vortaro kaj lernolibroj. Tio partoprenigis nin aktive por konstrui nian propran metodon de la simpla al la komplekso kaj de la konkreto al abstrakto. Gvidate de la instruisto, ĉiu partoprenis farante liston de substantivaj vortoj, verbaj vortoj, uzeblaj frazoj, partoj de la homa korpo, ktp. Dum nia dua kunveno ni faros fotojn por niaj geamikoj por ke ili havu ideon pri niaj unuaj lecionoj kaj alportu iun ideon kaj helpon ni. Ĝis la revido karaj amikoj”.

**José Dolores Gaitan Moreno**  
*De Enel Rubenia 75 varas al Norte*  
*Casa N° 23, Barrio Venezuela*  
*Managua, Nicaragua*  
<[gaitanmoreno@yahoo.es](mailto:gaitanmoreno@yahoo.es)>

## Pri Esperantistoj en Bolivio

Ĉu Ekzistas Esperantistoj en Bolivio? Efektive estas Esperantistoj en Bolivio. En 1993 okazis eĉ la 1-a Bolivia E-Kongreso kaj kelkaj el Argentino kaj Brazilo ĉeestis ĝin.

La frato de José Roberto ARZE el *Cochabamba* mem eklernis la lingvon. En tiu urbo (*Cochabamba*) estis la vera kerno de la tuto, ĉirkaŭ Wilhelmina Verhaaf. Ŝi bedaŭrinde forpasis antaŭ 3 jaroj kaj diversaj membroj de la grupo translokiĝis al aliaj regionoj de la lando (Oruro, Beni, ktp.) kaj la grupo iom disfalis. Hugo SORIA vizitis Ĉinion antaŭ 4 jaroj kaj renkontis multajn Esperantistojn. Verŝajne li ankoraŭ

korespondas kun amikino mia. Mi mem perdis la kontakton kun ĉiuj ili.

En *Santa Cruz* mi estis kaj efektive havis kontakton kun baha'anoj, kiuj varme akceptis min ĉe la Baha'a Universitato. Tie mi kontaktis iran sinjorinon, kiu estis mem profesoro en la Universitato (ŝia nomo estas Ruja Modaber). La rektoro volis, ke mi tuj restu en *Santa Cruz* por instrui dum 3 jaroj Esperanton... sed mi ne povis tiom longe resti.

**Atilio Orellana Rojas**  
*Nederlando/Argentino*

### E-Disvastigo

## Argumentoj

Certe estas miriga fakto ke nia internacia lingvo ne estas akceptita tuj ene de multaj jaroj post sia apero. Temas ja pri tute memkomprenebla avantaĝo por interhomaj kaj internaciaj rilatoj. La elstara esperantisto Claude Piron verŝajne estas tiu, kiu plej trafe esploris la koncernajn kaŭzojn. Eta resumo de liaj kaj aliaj konsideroj povas helpi je niaj disvastiga klopodo:

Multaj homoj timas ke oni volas malestimi sian denaskan lingvon. Sed tute male Esperanto agas por malhelpi superregadon de ununura nacia lingvo; ĉar ĝuste tio signifas malprestiĝo por la aliaj.

Akuzi lingvon pri ĝia “artefariteco” ne estas inteligente. Ĉiuj lingvoj estas ja iel faritaj, sendube ne “arte” sed “fuŝe”. La tre belaj latinidaj lingvoj naskiĝis el misparolita latina lingvo. La plej taŭga lingvo de la homaro estas arte kaj trafe farita de lerta saĝulo. Danke al tio oni

=>

<= povas lerni ĝin en dekono da tempo bezonata por akiro de nacia lingvo.

Nur tiu, kiu neniel konas la poeziajn juvelojn de nia lingvo, povas diri ke Esperanto ne kapablas naski emociojn kaj sentojn.

Verŝajne la repuŝo de nia lingvo ŝuldiĝas plejofte al simpla mallernemo

kaj mallaboremo kiuj karakterizas plejparton de la homoj, precipe koncerne al tio kie tujaj utilo kaj avantaĝo ne videblas.

Klarigi tiajn donitaĵojn al aliuloj helpas al ili pli juste taksi la valoron de nia lingva juvelo. -

**Werner Schad**

*San Carlos de Bariloche*

## Internacie

# La Plejpleja E-Festivalo en Finnlando

*...kun partopreno de argentina muzikisto*

De la 16-a ĝis la 23-a de julio 2005 okazis en Helsinko, Finnlando, la unika festivalo pri originale Esperanta kulturo, por ĉiuaĝaj kulturemuloj, t.e. KULTURA ESPERANTO-FESTIVALO [KEF]. Muziko, danco, teatro, komiksoj, literaturo, filmoj kaj ĉiuvesperaj diskejoj.

En KEF partoprenis la plej popularaj Esperantaj artistoj, i.a. *Esperanto Desperado*, *Dolĉamar*, *JoMo* kaj *la Libercanoj*, *Flavio Fonceca*, *Ĵomart*, *Nataŝa* kaj *Karina*, *Fraŭlino Barlaston*, *Teatra Grupo Tuluza*, kaj kompreneble ankaŭ nia samlandano *Alejandro Cossavella*.

Neniom da diapozitivoj, eĉ malpli da aferistoj... poemoj, prozo, vespero de erotika poezio, fabeloj, dancatelieroj, popmuzika ateliero, espokaraokeo kaj ekskurso al finna naturo, kaj multo pli iĝis ke la programo estu vere enhaviĉa. Sed, se ĉi-tio estus malmulto, ankaŭ por finlingvaj helsinkanoj estis elementa kurso de Esperanto.

Laŭ propraj vortesprimoj de s-ano *Alejandro Cossavella*:

-- "la laboro dum la evento estis intensa, plene je muziko kaj esperantaj kontaktoj. Ĝi estis belega arta festivalo kaj mi havis la okazon partopreni preskaŭ ĉiujn atelierojn kaj interkonatiĝi kun multaj el la plej elstaraj Esperantistoj tutmoondaj. Krome, mi

amikiĝis kun sciuroj kaj rusinoj, kun longegaj tagoj kaj finnoj. Finfine, post pluraj ludadoj kaj "oficialaj" kaj ne, mi koncertis kaj sola kaj kun tri *Dolĉamaranoj*, kiuj scipovis la Porkajn kanzonojn. Mi aperis en kelkaj naciaj ĵurnaloj kune kun la hispana E-poeto *Jorge Camacho* kaj kun operkantistino finna, kies nomo troviĝas en la paĝo de la festivalo:

[www.esperanto.fi/kef2005](http://www.esperanto.fi/kef2005) "



*Alejandro Cossavella dum la E-Festivalo*

# Miaj impresoj pri la 17-a Jalta Aromo

[*Lingva Esperanto-Festivalo*  
*Aroma Jalto*]

En la urbo *Jalta* sur Krimeo, (Ukrainio) renkontiĝis esperantistoj ĉi-jare, por celebri komencon de la somera sezono, dum 28-a de aprilo ĝis 12-a de majo 2005

Fakte ĉi-jara vetero estis pli malvarma ol tia dum pasintaj jaroj, sed tamen tiu malgranda obstaklo ne havis influon al nia riĉa programo.

Tiun-ĉi kongreseton partoprenis 100 esperantistoj el 11 landoj, unu paro venis eĉ el Kanado. Kongresejo estis luita “Domo de Instruisto” situita iomete for de la urbo -ĉirkaŭ 2 kilometroj sur la altaĵo je 300 metra alta.

La urbo *Jalta* situas en la valo ĉirkaŭita per montaro je alto 1500 metroj. Pro ĝia favora situo kaj milda klimato kreskas tie palmoj, cedroj kaj genistoj. En proksimeco de la centro troviĝas multaj sanatorioj kaj ripozdomoj. Kvankam estis komenco de la sezono sed surstrate oni povas vidi multajn kuracgastejojn kaj turistojn. En *Jalta* loĝas ĉ. 80.000 da loĝantoj, sed multoble pli troviĝas fremduloj, ripozantaj en modernaj sanatorioj funkciantaj dum la tuta jaro.

Inter la urbo-centro kaj la montoj sur deklivo estis konstruita domoj, privataj hoteloj kaj ripozdomoj. Tiu simbiozo de konstruaĵoj kaj dekliva roko kreas specifan pejzaĝon ĉar la konstruaĵoj aspektas kvazaŭ ili estis surgluitaj al tiu grandega roko.

Alispecaj domoj estas situataj ĉe la Nigra Maro ili havas ankaŭ sian ĉarmon. En *Jalta* bone funkcias trafiksystemo. Veturas tie trolejbusoj, busoj kaj busetoj nomataj “marŝrutka”. Prezo de unu

bileto estas 1 grivna (egalas al 0,25 dolaro) Ili veturas dum tago tre ofte. Oni pagas ĉe la ŝoforo.

Urbo *Jalta* havas longan historion. Antaŭ Kristo estis tie setlejo de grekoj, poste invadis turkoj kaj tartaroj. Pro tio oni povas viziti tartaran tombejon kun bele ornamitajn tomboŝtonojn. Antaŭ 250 jaroj imperiestrino Katarina la II-a ordonis ekkonstrui sanatoriojn por la cara kortego. Nuntempe sanatorioj apartenas al ĉiuj kiu disponas pri sufiĉo da mono por pagi restadon tie.

En *Jalta* oni povas trovi ŝpurojn de fama esperantistoj, pioniroj de nia movado. Ekzistas domoj kun memortabuloj de Nikolao Borovko kaj de fama kuracisto Ilija Ostrovski partoprenanto de la I-a UK en 1905 en Boulogne sur-Mer. Krome de tiuj menciitaj esperantistoj en *Jalta* loĝis vaste konata verkisto Anton Ĉehov. Lian domon, monumenton kaj ĝardenon oni povas viziti libere. Lia bela skulptaĵo “Damo kun hundo” staras sur bela, longa, ĉemara promenado. Ankaŭ lia somera dometo situanta 30 km. for de la urbo estas vizitebla ĉiam.

La urbo allogis Puŝkinon, do ankaŭ staras lia monumento kaj ekzistas muzeo de Puŝkin. Inter lokaj famaj homoj meritas mencii poetinon Ukrainka. Ŝia monumento staras antaŭ ŝia domo kion oni transformiĝis al muzeon.

Ne estas mia intenco listigi ĉiujn vidindaĵojn tio estus tro granda laboro. Mi deziras priskribi nur kelkajn plej gravajn por nia generacio.

Unuan kiun ni vizitis nomiĝis “Livadia” palaco. Konstruita en 1807,

apartenis al pola Grafo Potocki. En 1911 estis vendita al Nikolao la II-a. Arkitekto N. Krasnov rekonstruis ĝin en stilo itala renesanco. En ĉi-tiu palaco en februaro 1945 estis subskribita packonferenco inter Stalin, Roosevelt kaj Churchill. Ĝis nun estas konservataj dokumentoj pri tiu konferenco. La duan palacon, kiun ni vizitis oni nomas "Alupka".

Tiun palacon oni konstruis de 1828 ĝis 1851 laŭ la projekto de arkitekto E. Blor la sama kiu konstruis la palacon Bukhingam en Londono. Ĝi estis destinita al feldmarŝalo Voronzev. Tie loĝis angla ĉefministro Churchill dum li ĉeestis konferencon.

La tria palaco nomiĝas "Masandra" pro la kvartalo havanta saman nomon. Ĝi estis de la komenco konstruita al grafo Voronzev, sed poste vendita al caro Aleksander la III-a kaj li ĝin finkonstruis en la jaro 1902. Ĝin ĉirkaŭas bela ĝardeno. Ĉi-tie familio de caro ofte dum somera tempo ripozadis. En la palaco troviĝas bildoj de reĝa familio kaj desegnaĵoj pentritaj pere de reĝaj infanoj.

Krom menciitaj vidindaĵoj ekzistas aliaj valoraj, kiujn mi rekomendas al vi. La plej proksima renkontiĝo en Jalta okazos meze de septembro. Tiu renkontiĝo nomata "Velula Sezono" estos malfermita por ĉiuj loĝantoj kaj gastoj -senpage. Ĝi okazos sur granda placo kaj ĉemara promenado. Pli da informoj oni povas trovi en interreto:

[www.jaltaespero.narod.ru](http://www.jaltaespero.narod.ru)

*Eugeniusz Rybarczyk*

*Bispeparken 29. 1th*

*DK-2400 Kopenhago NV, Danio*

## **Agradecimiento**

Por las adhesiones y colaboraciones recibidas AEL agradece a: NN, W. Schad, J. Drucker, P. Prat.

## **Sveda**

### **Esperanto-Federacio**

#### **havas novan prezidanton**

*[La Espero 2005:3]*

La nordia institucio SEF ricevis novan prezidanton. En la jarkunveno en Haninge, en majo/05, Franko Luin transdonis la martelon al la nova prezidanto Bengt Olof Aradsson. La prezidenta martelo de la Federacio estas unika. En ĝi enestas ligno el la kvin kontinentoj. La ideo de Esperanto ja estas krei kontaktojn en la mondo.

## **Cómo enviar su adhesión a AEL**

Si Ud desea abonar su adhesión o colaborar con las tareas de AEL envíe su donación mediante depósito en Banco Francés, -sin costo-, cuenta N° 147-005789/3, a nombre de Alcides Pieter Wentinck  
DNI 93.709.394  
Calle Libertad 3226  
B1602DJD Florida - Vicente López  
Buenos Aires  
y luego informe sobre su operación a [wanelec@sion.com](mailto:wanelec@sion.com)

Si desea colaborar con la edición y distribución de la revista AE-Vento también puede enviar su contribución mediante el "Banco Patagonia" depositando su aporte en "Caja de Ahorro" suc. 110, Sáenz Peña, cuenta N° 394101439, del Sr. Oscar C. Monge, [sólo se descontará \$ 4,84 como gasto bancario por depósito]. Rogamos informar sobre su operación a esta redacción:

[rubendiaconu@yahoo.com.ar](mailto:rubendiaconu@yahoo.com.ar).

Muchas gracias una vez más, a todos nuestros colaboradores.

## Poemo

Este poema fue leído en el mes de mayo/2005 en una reunión de la SADE, en Buenos Aires, con motivo de la incorporación de *Ángela Siwinski* a la Sociedad Argentina de Escritores. El evento fue importante porque se autorizó a que Silvia Rottenberg, leyera también la traducción del Poema en esperanto, idioma que la poetisa está estudiando.

### **Amo Forestanta**

Neniam mi scios kial vi foriris,  
neniam vi scios l' aflikton  
kiun preterlasis.  
Hodiaŭ atingas min  
viaj maŭrokuloj, via rideto diafana,  
via varmeco de amiko.

Neniam mi scios kial vi foriris,  
neniam vi scios l' aflikton  
kiun preterlasis.

*Ángela Siwinski*

[Tradukis el la hispana: Kompreno]

Verko de poetino, loĝanta en *Buenos Aires* kiu lernas E-on. La poemo estis deklamita de Silvia Rottenberg -ankaŭ Esperante- okaze de kunveno de SADE (Asocio de Argentinaj Verkistoj), majo 2005.

### **Amor Ausente**

*Nunca sabré por qué te fuiste,  
nunca sabrás la pena  
que dejaste.  
Hoy llegan a mí  
tus ojos moros, tu sonrisa diáfana,  
tu calidez de amigo.*

*Nunca sabré por qué te fuiste  
nunca sabrás la pena  
que dejaste.*

*Ángela Siwinski*

## El la Leterkesto

Dankon! Mi estas kontenta scii pri la kresko de Esperanto en argentinaj regionoj malproksimaj de grandaj urboj.

*Jozefo Lunazzi  
Campinas, Brazilo*

## Ni ricevis interŝanĝe

La Redakcio dankas pro jenaj E-ricevaĵoj:

Esperanto [NL],  
Heroldo de Esperanto [CH],  
La Espero [SE], Bazarro [RO],  
Antaŭen [ES], Medicina Heroldo [BR]

\*

Visite la página Web de AEL:

**[www.esperanto.org.ar](http://www.esperanto.org.ar)**

y envíe su opinión, sugerencias  
y/o informe, a:

<esperanto@neunet.com.ar>

\*

## Libroservo

Para obtener material impreso en y/o sobre esperanto consulte al Libro-servio de AEL. Visite nuestra página Web, o escriba a:

René Arce

9 de Julio 1586

X5000 Córdoba

<arserene2002@yahoo.com.ar>

## NIA SPACŜIPO

*Mallongigita komentario por klarigi, je popola nivelo, supraĵen konitan temon, kiu profunde traktita estas tre interesa*

Ni ĉiuj memoras, ke en la elementa lernejo kaj poste en la mezlernejo ni traktis supraĵe la Termovadojn: turniĝo sur sia akso kaj translokado ĉirkaŭ la Suno.

La astronomoj malkovris, ke fakte Tero realigas 14 malsamajn movadojn, sed mi parolos nur pri kvar el tiuj ĉar mi konsideras pli interesa por tiu ĉi komentario.

Mi komencas kun la turniĝa movado, dirante ke Tero ĝin faras en 24 horoj. Tiel se ni prenas kiel referenco Ekvatora punkto, ĝi turniĝas kun tangenta rapideco de 1.600 km/hore. Tio estas je supersona rapideco, duobla al la komercaj jetaj rapideco.

Mi daŭrigas kun la translokado ĉirkaŭ la Suno realigata en unu jaro, trairanta la 900 milionoj da kmj kiuj havas sian orbiton. Tio signifas ke nia planedo devas vojaĝi je 108.000 km/hore, eĉ trioblo de la rapideco de la artefaritaj satelitoj. Nun mi parolos pri movadon eĉ nekonata de la plimulto de la personoj kiun Tero realigas akompananta al la Suno en sia trans-spaca vojaĝo iranta kun ĉiuj planedoj kaj satelitoj al "Apex Solar".

imaga punkto situata direkten al la stelo *Vega de la Liro* konstelacio kun rapideco de 72.000 km/hore.

Kaj poste kvara movado, realigata de nia galaksio al kiu apartenas nia Suno, trenanta nin al la Kaprikornio-konstelacio kun rapideco de 600 km/sekunde.

Post koni tiujn ĉi movadojn kaj taksu la translokada rapideco de la Tero en siaj malsamaj movadoj, oni komprenas ke la Homaro vojaĝas en nia planedo kiel ŝipanoj de mirinda spacŝipo, en kiu ni naskas, vivas kaj mortas dum ĝi delokiĝas portanta nin en fantastika vojaĝo tra la Kosmo, kaj montranta al ni en ĉiuj stelaj noktoj, la mirindaĵon de la Kreado.

En alia momento mi rakontos pli detale pri tiu ĉi "spacŝipo" kiu estas nia habituso kaj kiel ekcepto estas la nura planedo kie povas loĝi la Homo por havi certigata ĉiujn kondiĉojn por la postvivado.

Dume, mi deziras al vi plezuratan vojaĝon tra la spaco, sen sekureca zono nek semaforoj kaj sen ŝarĝi nafton. Bonŝancon!

*Verkita de **Jesús Sarquis**, fondinto de  
Marplatana Astronomia Observejo.  
Esperantigis: **Sergio Rodríguez**,  
Fajrolando*

Redakcio de Argentina E-Ligo: Calles 119 y 122, AR-H3700FTT Pres.R. Sáenz Peña, Argentino

AL

